

uzu siajn vortodifinajn Pivojn kaj Revojn, uzu siajn nociodismetajn vikipediojn kaj enciklopedietojn. Tiel nia popolo plikoherigos sian kreskantan klorecon pri la mondo, la monderoj, la mondanoj, kaj sukcesos saĝe stiri la diversajn klarigajn ĉarojn, ekipitajn per bildoj, per vortoj, per faktoj.

Ĉu mi ĉi tiel voĉdonas kontraŭ la tro germana ekirpunkto de nia Dudenon? Tute ne; tia voĉdono estus draste sendanka al la erudiciaj kaj senlacaj laborantoj, kiuj kreis la malnovan kaj la ĵusan versiojn de la Esperanta Dudenon! Mi pledas por senŝancela agnosko pri ĝiaj konkretaj radikoj en la germana humo, kaj por klarvida pluirto al pli inkluzivema kaj diversisma prezentomaniero en estontaj versioj. Kiavoje ni atingu tion? Mi proponus, ke aperu enlibre po unu 'tipa' bildo (ekz de 'vivoĉambro', eventuale laŭ la germana modelo pro la neforgesinda historio de la verkiĝo de niaj Dudenonj) kaj ke la reta versio trovebla en wuala.com/Retbutiko/Bildvortaro liveru ligojn al diversaj alternativoj.

Por ne perdiĝi en ĝangalo, ni sendube akceptos iom da ordo-krea tipigado kaj ŝablonfarado ankaŭ kiam ni fasonos tiajn alternativajn prezentojn. Kiom da tipigado, kaj kun kiaj bazoj aŭ nulagordoj? Tion decidis la evoluo mem. Estis revolucio de Zamenhof lanĉi prototipon kaj post nur unu jaro lasi ĝian pluiron al la 'evolucia' vojo. Recenzante la ĉi-jaran Dudenon, ni nur revizitas la ĝisnunon de tiu (ankoraŭ nesufiĉe pripensita/ prifestita/ daŭrigata) revolucio kaj refortigas nian emon debati inter ni. Tiu nia emo estas grava faktoro subtenanta la kapablon evoluigadi unike kristalan fenestrolingvon, kies lumo pliheligas ankaŭ nian komprenon de la eroj de niaj etnaj lingvoj.

Ricardo Felipe Albert Reyna

Amdonaco inter amantoj

Dialogo, de Júlia Sigmond, ilustrita de Orsolya Láng, eldonejo Exit, Cluj-Napoca, 2012, 80 p., ISBN 978-606-93230-5-2.

Júlia Sigmond estas unu el pluraj diverstalentaj reprezentantoj de tio, kion mi nomas "popola literaturo en esperanto", kies precipaj trajtoj ĝis nun estas malelitisimo kaj sentimentalismo. Kiel faris siatempe Julio Baghy kaj faras hodiaŭ ŝia edzo Filippo (plumnomo: Sen Rodin), ŝi verkas facile legeblajn prozaĵojn kaj versaĵojn kun sincera redono de ĉiutage renkonteblaj homoj kaj ties sentoj en formo de senpretendaj

roluloj (aŭ eble pretendantaj sin reprezentantoj de la “normalaj, averaĝaj homamasoj”, tamen en moderneŭropa kadro), kies vivospertojn kaj akompanajn sentojn kaj pensojn la verkisto prezentas kun aspiro al ia universaleco, laŭ mi neatingebla en la kunteksto de tiu limigite moderneŭropa mondobildo.

Ĉi tiu libro konsistas el unu tia poemo kaj ties traduko en 52 diverslingvaj versioj, iel reprezentantaj la diverslingvecon de la nunaj esperantistoj (do mankas indiĝenaj lingvoj de Ameriko kaj Oceanio, dum surprizas plaĉa traduko en la latina).


La originalo aperis en *Beletra Almanako 12* (oktoebro 2011, p. 23). Ĝi konsistas el 13 demandoj kun respektivaj 13 respondoj. Tiuj dialogeroj esploras limojn de amo: kion ĝi kapablas aŭ ne kapablas. Ili ilustras vorte la (pravan aŭ malpravan) tezon, ke amo portas feliĉon kaj superas ĉian baron, dum estas vivo, kun eventuala subkompreno, ke ami estas io pli ol dividi; ke amo estas aspiro al belo, vero, bono. La nombro 13 estas alegorio de morto en multaj kristanaj kulturoj (ekzemple, la ĉeesto de dek tri viroj ĉe la Sankta Manĝo, kies dektria partoprenanto estis la laŭtradicie perfida Judaso, iel antaŭanoncis la morton de Jesuo, laŭ multaj kristanoj); tamen mi trovas en la poemo neniun aludon al la fama temo, ke amo povas superi morton, nek la inversan bildon, ke la lastversa *Dum ni vivos* metas limon al la amo, kiel la morto metas limon al la vivo.

Kaj la demandoj kaj la respondoj estas unulinie mallongaj, iam kun preskaŭaj rimoj (ekzemple: *doloros / ekparolos*), pli ofte kun asonancoj (*estos / silentos*) kaj agordoj (*aŭdos / vidos*), kaj precipe kun la senĉesa martelado de *la alia* aŭ *la alian* en la fino de multaj versoj. Malgraŭ tiuj diverslertaj rimedoj de la verstekniko, la precipa ritmelemento estas la alterno de demandoj kaj respondoj, kiel bildo de tio, ke amo ebligas respondi al demandoj de amanto.

La tuton ornamas dudek tutpaĝaj, plume desegnitaj, blanka-nigraj bildoj, plus humila branĉeto sur la suba, dekstra angulo de la dediĉa paĝo, duonpaĝa desegno sur la kovrilo kaj adiaŭa gramofono post la teksto, kiu prezentas la aŭtorinon, sur la postkovrilo. Ilia gvidfadeno ŝajnas esti diversaj flankoj de amo.

Kvazaŭ responde al la poemo, la edzo de la poetino tradukis ĝin nacilingven, post kio komencis alveni traduko post traduko, jen spon-tana, jen mendita, ĝis la menciita nombro 52.

Multaj el la nomoj de tradukintoj estas vaste konataj, dum aliaj ne estas tiel famaj. Plurfoje eblas kompari versiojn, kiuj estas tre proksimaj



inter si: angla-brita / angla-usona, flandra-nederlanda / nederlanda, indonezia / malaja, kroata / serba, persa / taĝika. Foje la komparoj fariĝas pli subjektivaj, kiel tiu inter la hispana kaj la kataluna, ĉe kiuj mi sentas la duan pli leĝera kompare kun la unua, pli plumpa (ambaŭ de esperantuje famaj poetoj).

Ĉi tiu libro povas havi diversan legantaron. Unuflanke, ĝi povas interesi lingvemulojn. Sed ĝi povas interesi ankaŭ homojn, kiuj volas prezenti facile legeblan, tamen kortuŝan, poemon ekster Esperantujo. Komprenoble, ĉe tia prezento ĉiam estas risko de impresoj, ke esperanto estas nur kabineta eksperimento, dum ĝi estas ankaŭ multaj aliaj aferoj.

Laŭ mia kompreno, la libro estas taŭga amdonaco inter amanta paro. Kaj antaŭ tia ampokalo, eble ni ne ŝovu nian nazon en fremdan vazon, sed, por plaĉi al la latina Katulo, ni nur lasu la paron ĝui sian amon.

Francisco Javier Moleón

Perfido - ĉu al la originalo?

Perfidulo, de Narayan Sanyal, el la bengala tradukis S. S. Pal, eld. F/ederacio/ E/speranto de /B/arato/ en Kalkato, Howrah, 2013, 160 p., ISBN 9788190686136.

La libron *Perfidulo* mi aĉetis (unua eraro) kaj legis (dua eraro). Ĝi ŝajnis interesa – kaj ĝi ja estas interesa, la enhavo estas eĉ atentokapta. Aŭ pli ĝuste: estUS. Mi bedaŭras devi diri ĉi tion: la lingvaĵo de la traduko estas fuŝega, subnivela, plenplena je eraroj. La leganto devas preskaŭ ĉiufraze provi kompreni, kion oni celas, kio kaŝiĝas sub la misoj. Krome, daŭre oni devas divenadi, kiu rolulo diras kion aŭ ĉu entute la koncernaj frazoj estas priskribo, ĉar alineigo kaj helpa interpunkcio estas hazardaj kaj la frazojn oni simple apudmetas sen ajna indiko pri ŝanĝo de rolulo aŭ priskribo. Leginte ĉiun frazon, la leganto devas ĉiufoje decidi, kiu diris kion. Kaj tio tra 160 paĝoj... Legado estas treege pena kaj apenaŭ plezurdonas.

Renato Corsetti sendis retmesaĝon al multnombraj aziaj E-forumoj, en kiu li laŭdis la libron kaj priĝojis ĝian publikigon. Krome li verkis la antaŭparolon al la libro, kiun li evidente ne legis: alie li ne aŭdacus ĝoji pri la apero de tia lingva fatraso.